
Arušo sabaton, la 10-an de aŭgusto 2024 numero 7

# La Voĉo de Kilimanĝaro

Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

## Donaco al la Afrika Fondaĵo

En 2024 Esperanto-Asocio de Britio gajnis la premion Infanlibro de la Jaro en la Belartaj Konkursoj de UEA pro la libro *Doktoro Zamenhof kaj la lingvo de espero*, pro kio EAB rajtas je premio de 546 €. Nome de EAB la eldonisto Tim Owen decidis donaci tiun premion al la Fondaĵo Afriko por subteni la distribuadon de libroj al Afriko.
UEA regratulas kaj kore dankas al Tim Owen kaj EAB pro la malavara ago, kiu rekonfirmas ilian mision por kulturo kaj edukado en Esperanto!




## Kunsidis kristanoj

Ĉi-jare malmultaj fakaj asocioj ĉeestis en la UK. Unu el ili estas Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kiu prizorgis la kunvenon de kristanoj. Partoprenis pluraj esperantistoj, ĉefe el Afriko, el kiuj nur malmultaj estis protestantoj, kaj pluraj katolikoj. Komence estis legita la mesaĝo de la prezidanto de Kristana Esperantista Ligo Esperantista (KELI) Philippe Cousson. La multflankan agadon kaj historion de IKUE prezentis ĝia prezidantino Marija Belošević. La partoprenantoj povis provizi sin per eldonaĵoj de IKUE kaj informoj.

**Marija Belošević**, KN 306

## Laŭreatoj de la Lingva Defio



7 kandidatoj konkursis en la salono Hodler kadre de la Lingva Defio pri la svahila en vendredo la 9-an de julio 2024 je la 13:15, antaŭ juĝantaro konsistanta el Espoir Kasati, Dankon Kwibe, Charles Hiza kaj Joel Muhire.
La kandidatoj devis unue sin prezenti en la svahila lingvo, poste respondi kelkajn bazajn demandojn.
Gratulon al ĉiuj kandidatoj, kiuj ricevis dulingvan libron *La sovaĝaj cignoj*. Laŭdon al la 3 gajnintoj, ordigitaj laŭ vortproviza kapablo: 1. Renato Corsetti (Britio), 2. JESA (Koreio) kaj 3. Didi (Svisio).

**Aleks Kadar**
Ĝenerala sekretario de UEA

## Libroj instigis viglan diskuton pri medio

Vendrede Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) dum la programero "Aŭtora duonprogramero" prezentis siajn plej novajn eldonaĵojn. Nome okaze de la 109-a UK, samkiel pasintjare, IKUE kontribuis al la kongresa temo. Sekve, ĝi eldonis du tradukojn de la verkoj de Papo Francisko. Temas pri la Encikliko "Laudato si'" kaj Apostola instigo "Laudate Deum".
La verkojn prezentis Marija Belošević, prezidantino de IKUE kaj la redaktorino de la libroj. Al la traduko kontribuis esperantistoj el deko da landoj.
La temo de ambaŭ libroj estas medio, kun la mesaĝo de la Papo "Ni zorgu pri nia komuna domo, la tero". Tiu instigo gravas por ĉiuj, ĉu apartenantoj al iu religio, aŭ sen religiuloj.
Post la prezento, ekis vigla diskuto pri la naturprotektado kun interŝanĝo de spertoj el unuopaj landoj. Kiuj havas intereson pri la libroj turnu sin al: ikue@ikue.org.

## Refoje kunsidis Oomoto



La 2-a kunsido de Oomoto okazis de la 9-a ĝis la 10-a kaj tri kvaronoj en la 9-a de aŭgusto kun ĉirkaŭ 50 ĉeestantoj. D-ro Karlo ROWE prezentis malferman saluton. Post voĉlego el sankta libro de Oomoto Diaj Revelacioj fare de s-ro ŜIBATA Satomi kaj ĉinkon-meditado gvidita de s-ro OKUŬAKI Toŝiomi, la ĝenerala sekretario de EPA (Esperanto-Populariga Asocio: la satelita organizo de Oomoto pri Esperanto), d-ro ROWE parolis pri la kongresa temo anstataŭ s-ro TABUĈI Jasuo, kiu ne povis ĉeesti pro trafika akcidento. Sekvis kantado de Gloro el ambonaj kantoj verkitaj de Kunfondinto de Oomoto, DEGUĈI Onisaburo. Poste estis filma paŭzo. Du filmetoj Miroku-danco kaj Utafesto estis prezentitaj. En la malantaŭa parto de la kunsido, s-ro OKUŬAKI invitis ĉeestantojn al Utafesto en 2025. Sekvis la filmo pri batalarto Aikido kaj Oomoto kaj reala ĉantado de Esperanta utao. Kaj s-ino Mireille Grosjean el Svislando parolis pri sia rilato kun Oomoto. Krome, ĉiuj ĝuis Miroku-dancon kaj fine s-ro DEGUĈI Micugi faris ferman saluton.

**OKUUXAKI Tosxiomi**

## Nepalo invitas por speciala ekskurso

La Nepala Esperanto-Asocio anoncas 12-tagan specialan ekskurson de la 26-a de februaro ĝis la 8-a de marto 2025. NEspA okazigas la Himalajan Renkontiĝon en ĉiu dua jaro. Tiu ĉi aranĝo signifas plejparte piedvagadon en la montaro, sed tio ne eblas por ĉiuj aĝgrupoj. Multaj samideanoj volas viziti Nepalon sed timas tian marŝadon. Ĉi-foje ni okazigos do ekskurson al famaj nepalaj turismaj lokoj atingeblaj per buso kaj sub belaj pejzaĝoj inkluzive la famajn montarojn videblajn en Pokhara, Katmanduo, Ĉitŭan Nacia Parko, Lumbini, Palpa kaj Pokhara. La Nepala Esperanto-movado kreskas pli kaj pli, sed ne ĉiuj anoj de NEspA povas viziti eksterajn landojn pro la kostoj, almenaŭ eblas inviti amikojn el aliaj landoj ĉe ni. Kaj tio montriĝis fakte efika programo. La ĉefa celo de la programo estas konigi Nepalon kaj nepalajn esperantistojn al la mondo kaj reciproke.
Nepalo estas ebria miksaĵo: fascina lando de antikva historio, viglaj kulturoj kaj popoloj, biodiverseco kaj majestaj pejzaĝoj.

**Bharat Kumar Ghimire**, KN 775

## De amiko por Miroslav M.

Kara Mirek!
Ricevu miajn elkorajn salutojn en Aruŝo, Tanzanio, kie vi estas kun viaj samlandanoj kaj samdelegacianoj (inkluzive de la prezidanto de ĈEA, prezidanto de E-klubo de Brno, ktp.) kongresantaj kadre de la 109-a Universala Kongreso. Eĉ for, tre for de la kongresurbo multajn informojn mi legis pri tiu grava evento per la Kongresa Kuriero "La Voĉo de Kilimanĝaro", kiu aperis regule.
Post nur kelkaj horoj estos la fino de tiu internacia kunestado. Tiam vi (Ĉeĥa delegacio) transprenos la E-flagon por la organizado de la tuj venonta UK, la 110-a en Brno, Ĉeĥio. Mi subtenas vian landon kaj esperas, ke la tutmonda esperantistaro denove ariĝos post dek du(12) monatoj en Brno – la bela kongresurbo.
Vivu Esperanto!
Vivu la Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA)!
Vivu la Loka Kongresa Komitato (LKK)!
Vivu la loka E-klubo "Esperantista Klubo de Brno" por, ke sukcesu la kongreso en Brno.
Bonan revojaĝon al Ĉeĥio.

**Kokou Sagbadjélou**,
Togolando

## Du internaciaj konkursoj de KEU

Kroata Esperantista Unuiĝo informas pri du konkursoj.
La 8-a Tradukkonkurso "Lucija Borčić" bonvenigas tradukojn ĉu prozajn, ĉu poeziajn el iu ajn lingvo al Esperanto. Pli da informoj: hes.keu@gmail.com kaj *https://eventaservo.org/e/54df02*.
La fotokonkurson rajtas partopreni ĉiuj esperantistoj kiuj iam vizitis Kroation. Pli da informoj: hes.keu@gmail.com kaj *https://eventaservo.org/e/a3244d*.

**Marija Belošević**, KN 306




Kelkaj ekskursantoj ĉirkaŭ Kilimanĝaro.

## Raporto pri la Infana Kongreso



Ĉi-jare la Internacia Infana Kongreso arigis 9 infanojn kaj 20 adoleskantojn de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto en *Catholic Archdiocese of Arusha*. Tie ĉiuj kune travivis interesan sperton. Per kantoj, desegnaĵoj kaj dancoj la partoprenantoj lernis, amuziĝis kaj la knabinoj eĉ pli lertiĝis pri kudraĵo. La adoleskantoj havis rajton viziti la UK kiam ajn ili tion volis aŭ trovis iun eron de ĝi pri kiu ili interesiĝis. Per multe da ludoj la etuloj estis prizorgitaj. Ili ankaŭ lernis Esperanton. Ni provis paroligi ilin en Esperanto kaj se kelkfoje ili ne komprenis, ni uzis la anglan, svahila aŭ la franca. Nia precipa laborlingvo tamen estis Esperanto.
Kiel la aliaj kongresanoj, la infanoj havis ankaŭ la eblon iri al ekskursoj. Ili ekzemple jaŭde vizitis la nacian muzeon. La deĵorado en la infana kongreso multe helpis pliriĉigi miajn spertojn de Esperanto-instruisto. Dum la IKK ni faris multajn aktivaĵojn kun la infanoj, lernigante al ili pri Esperanto. Kaj la infanoj ankaŭ vere amuziĝis dum la kongreso. Iu knabino, kiu en la komenco tute estis timema eĉ kiam ni parolis al ŝi en ties gepatra lingvo, tute ne volis paroli. Sed post kiam ni ludis, dancis, kantis kun ŝi, ŝi tuj malfermiĝis al ĉiuj. Tio ĉi estis vere granda sperto por mi. Mi pasigis tre laboran, sed ankaŭ agrablan momenton kune kun la infanoj.

**Ranja Zafinifotsy**

## Kelkaj ricevitaj impresoj

*Mi tie ĉi estis invitito de TEJO kiel oficiala reprezentanto nome de la estraro. Krom tio mi okupiĝis ankaŭ pri la junulara programo pri kiu mi plej multe helpis – estis aliaj (…) kaj Espoir Kasati kiuj plej parte zorgis. Estis diversaj rezultoj de la junulara programo kaj mi tre ŝatis kiel mozaike preskaŭ ĉiuj afrikaj junuloj partoprenis ĉar tio ne estis kutima por niaj kongresoj. Laŭ tio, kion mi mem spertis kaj partoprenis – tamen montriĝis pluraj diferencoj pri kulturoj pri kiuj ni ne antaŭvidis, ne sciis antaŭe. Ekzemple, kiom frue afrikanoj iras enlitiĝi – tion vere konfliktis kun granda parto de la junulara programo ĝuste la vespera.*

**Michal Matúšov**

## Alvoko por traduki la poemon *Aŭtuna foliaro* de Julio Baghy nacilingven

Grandan parton de sia sukceso dankas Esperanto al la regulo 16. Almenaŭ tiel opiniis Istvan Szabolcs en sia prelego pri Budapeŝta Skolo – Literatura Mondo farita dum Kleriga Lundo. Zamenhof genie ekkonjektis la rolon kaj signifon de poezio, pri kio jam la fama hungara poeto Sándor Petőfi afiŝis ke tio estas la plej alta nivelo de alparolo al samlingvana komunumo. Poetoj malfermas tavolojn kaj de la animo kaj de la menso. Verkado de gigantoj de Budapeŝta Skolo kiel Kalocsay kaj Paĉjo Baghy starigis Esperanton sur egalan nivelon al aliaj lingvoj ankaŭ en poezio. *Chanson d'automne* (aŭtuna kanto) de Paul Verlaine en sia ĝenro unu el la plej belaj poemoj de mondliteraturo arttraduke haveblas en multaj lingvoj. Aŭtuna foliaro, poemo de Julio Baghy neniel postrestas al ĝi. Istvan Szabolcs deklamis ankaŭ ties hungaran tradukon, farita de li kaj parolis pri tio kiel efike povis jam uzi tion en la movada laboro inter deputitoj de Hungario en la Eŭropa parlamento kaj aliaj gravuloj. Li do turnis al la Esperantistaro al ŝatantoj de poezio kun alvoko por arttraduki ĉi tiun poemon nacilingven ju pli da lingvoj des pli bone. La ĉeestanta publiko entuziasme kaj konsentante akceptis la alvokon.

**Szabolcs Istvan**, KN 151

*Ege plaĉis al mi la 109-a UK; unuafoje tiu ĉi renkontiĝo okazis en Afriko. Vidu tiun amason da homoj kiuj partoprenis en ĝi. Pli ol 800 homoj el kiuj 300 gejunuloj estis de Afriko. Tio ĉi montras, ke la movado en Afriko aktiviĝas kaj aktiviĝos. Tio montras ankaŭ, ke la E-movado estas tutmonda aŭ tutmondiĝis. Mi ege ĝojis ke mi povis ekkonatiĝi kun novaj personoj kaj revidi miajn malnovajn geamikojn kun kiuj mi ekrenkontiĝis en Eŭropo. Dum la tuta kongresa semajno estis prelegoj, koncertoj, kursoj, ktp. Ĉio disvolviĝis glite kaj glate!*

**John Magessa**, KN 55

*Mi venis de Germanio por la UK. Mi partoprenis en Safario tri tagojn kaj tio vere estis interesa – mi neniam antaŭe faris. Ni pasigis kunkune la tempon por vidi belajn pejzaĝojn, bestojn, spertis kaj fotis multon kompreneble, kaj kun tre agrabla akompano de ĉiĉerono. Ni havis tre talentan ĉiĉeronon, kiu povis paroli la anglan, la francan sufiĉe bone kaj la germanan flue, eĉ 27-jaraĝa! Tio estis tre agrabla. Li estis ĝentilema. Mi povus imagi min iam reveni en Afriko se estos iu aranĝo…*

**KN 117**

*Mi sentis min plenigita de energio kaj entuziasmo por plulerni Esperanton kaj partopreni en la movado. La kolektiva Esperanto-pasio de la UK-partoprenantoj estis kontaĝa!*

**Vivuya M. Djofina**

***Impresojn registris por "La Voĉo de Kilimanĝaro", Martina Sachs-Bockelmann,*** *KN 248*
***kaj subpreme provlegis ĉiun numeron, Sagbadjélou Kokou (Togalando).***
***Mian koran DANKON al ambaŭ personoj!***

Ĉl-sube: kelkaj el la fotoj de **John Huang**, KN 210 - oficiala fotisto de la UK




Dum la solena malfermo




… Komitatkunside



Dumbankede…



Dum la Movada Foiro kun (maldekstre) Anna Lowenstein…



Kongresfak-anoj kun tuj ekskursontoj…

# Ĝis revido en Brno, Ĉeĥio en la 110-a UK !

110-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO * BRNO 19-26 JULIO 2025 *